

Esperanto en Skotlando

Esperanto in Scotland – Esperanto ann an Alba
Vintro 2015 - £2.50/€3



Enhavaj Elstaraĵoj – E-traduko de “In Flanders Field” - Enangligo
de “Odo al delfoj” - Babilado kun Dio

Esperanto en Skotlando

Numero 202 - Vintro 2015 -ISSN 0014-0643

Redaktoro: Ed Robertson

Redakcia adreso: 52 Easter Drylaw View,

Helpredaktoro: Hju Rid

Edinburgh, EH4 2QP

Administranto: Mia Casey

Telefono: 07970 156549

Rete: ed.robertson@esperanto.org.uk

La redakcio bonvenigas kontribuaĵojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limdato por la venonta kajero de **Esperanto en Skotlando: 31a de marto 2016**. Oni sendu kontribuaĵojn elektronike kiel simplan tekston aŭ uzante la formaton OpenOffice.org Writer aŭ LibreOffice Writer (senpage haveblaj de la koncernaj retejoj). Dokumentoj en la formato Word ankaŭ estos akceptataj. Se la formato aŭ tiparo uzata en via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, diversaj surogataj sistemoj estas akcepteblaj.

Enhavo

El Katedro.....	3
Parolante pri Nenio: Máire MacAoidh.....	4
Vizito al Pollando: Sheila Henderson.....	10
Howard Phillips Lovecraft: Donald Robertson.....	11
La Vie Est Belle: Hju Rid.....	13
Filisa (Phyllis) Ethel Goodheir (1918 – 2015).....	24
Babilado kun Dio: Anonima (elangligis Ed Robertson).....	26
En Flandraj Kampoj: Lieut. Col. John McCrae, MD (elangligis Garbhan MacAoidh).....	40
Kortuŝa rakonto pri la vivo de Jak Cent (1898-1953): Mia Casey.....	41
Kie ĝi estas?: Jak Cent.....	42
Tradukaj Defioj.....	44
111-a Skota Konreso: Informo kaj Aliĝilo.....	47
Kalendaro.....	49

La opinioj esprimitaj en Esperanto en Skotlando ne nepre kongruas kun tiuj de Esperanto en Skotlando aŭ EAS. Esperanto en Skotlando estas publikaĵo de la

Esperanto-Asocio de Skotlando: SC042398

Prezidanto: Duncan Thomson

Vic-Prezidanto: Ed Robertson

Sekretario: David Bisset

Kasisto: David Hannah

Adreso: 47 Airbles Crescent,
Motherwell, ML1 3AP

Telefono: 01698 263 199

Rete: secretary@skotlando.org

El Katedro

Grundtvigaj projektoj sukcese kompletigitaj

Atentaj legantoj memoros ke dum la lastaj du jaroj EAS partoprenis du projektojn sub la egido de la programo por dumviva lernado ĉe la Eŭropa Komisiono. La unua projekto havis la titolon **“Elloke tutmonden: la novaj defioj de volontulado”** kaj la dua **“Volontulado kiel persona pluevoluiĝo: kiel pliboniĝi?”**. Ĉiu el la du projektoj konsistis el kunlaborado de EAS kun po kvin aliaj Esperanto-organizoj el diversaj EU-landoj: Bjalistoka Esperanto-Societo (Pollando), Triesta Esperanto-Asocio (Italio), Verĉela Esperanto-Grupo (Italio), Esperanto-Rok-Asocio (Francio), kaj Esperanto-Klubo de Visaginas/Asorti (Litovio) por la unua projekto, kaj Nederlanda Esperanto-Junularo, Junulara Esperantista Franca Organizo, Federacio EDE (“Eŭropo, Demokratio, Esperanto”, diverslanda membraro, sed bazita en Francio), Pola Esperanto-Junularo, Torina Esperanto-Centro (Italio) kaj Arci Esperanto (Italio) por la dua projekto. Ambaŭ projektoj konsistis el reciprokaj vizitoj al la partneraj landoj, kaj instruprogramoj pri diversaj utilaj lertoj por aktivaj partoprenantoj en niaj volontulaj organizoj. Krom, kompreneble, la ebleco kapti la okazon por konatiĝi kaj amuziĝi kune pere de nia komuna lingvo Esperanto. Ambaŭ projektoj estis nun taksitaj kiel sukcese plenumitaj de la koncernaj EU-instancoj. La oficiala kontrolanto de la fina raporto por unu el la projektoj konfesis pri komenca skeptikemo pri la taŭgeco de Esperanto kiel laborlingvo por la projekto, sed ke, ŝajne iomete surprizige al tiu kontrolanto, **ESPERANTO FUNKCIIS!** Tiun rivelaĵon legantoj de ĉi tiu publikaĵo ne konsideros eĉ ete eksterordinara, tamen indas menciiti tion ĉiaokaze. Dankon al ĉiuj, kiuj involviĝis.

Dua Tutkelta Kongreso de Esperanto

Parolante pri Grundtvig, ni certe memoras la sukceson de la Unua Tutkelta Kongreso de Esperanto en Pitlochry, Skotlando, en Majo 2014, kiun partoprenis ankaŭ multaj el niaj Grundtvigaj partner-organizoj, krom vizitantoj el diversaj keltaj kaj najbaraj landoj. Sekvante tion, ni feliĉas transdoni la anoncon, ke la **Dua Tutkelta Kongreso de Esperanto** okazos en la bela ĉarma vilaĝo Plouézec (bretone Ploueg-ar-Mor), Bretonio, samtempe kun la 20aj Internaciaj Pluezekaj Renkontiĝoj, **de la 13a ĝis la 20a de Aŭgusto 2016**, organizita de niaj bretonaj samideanoj. La organizantoj promesas, ke ili preparas specialan buntan programon, interalie kun sakŝalmistoj, kaj ekskurso al la sanktula monteto ĉe Carnoët. Ĉi-jare la Pluezekaj Renkontiĝoj allogis partoprenantojn interalie el Ĉinio, Nepalo, Italio, Ukrainio, Hungario kaj Francio. Partoprenantoj pasigis kune belan semajnon kun multe da amuziĝo, muziko, ludoj, lernado kaj amikema etoso: antaŭtagmeze la ĉeestantoj povis partopreni Esperantajn kursojn en 4 diversaj niveloj, posttagmeze atelierojn pri interesaj temoj (Nepalo, origamio, joko, kuirarto, kantoj, teatro), kaj povis turismumi sur la belaj marbordoj de la ĉirkaŭaĵo de Pluezek. Dum la vesperoj oni kantis Esperante, dancis kaj muzikumis bretone, aŭskultis interesajn prelegojn pri diversaj landoj kaj kompreneble multe amuziĝis. La organizantoj diras **“Venontjare ni ĉiun tutkore bonvenigas, kiuj deziras gustumi bretonajn bongustaĵojn, kaj partopreni amuzan amikeman semajnon!”**. Do metu tuj en vian taglibron, kaj ni certigu pri bona taĉmento el Skotlando.

Kontribuoj

Fine, ni memorigas al ĉiuj legantoj (ne nepras loĝi en Skotlando), ke viaj kontribuoj estas bonvenaj, ĉu temas pri raporto, eduka peco pri ajna temo, beletraĵo aŭ eĉ polemiko. Verku kaj sendu ĝin!

Ed Robertson

Parolante pri Nenio: Máire MacAoidh

Nun, kio estas nenio? Verŝajne multaj homoj pripensis la aferon, aŭskultu: Ni portis nenion al la mondo, kaj sekure ni povas porti nenion el ĝi (Sankta Paŭlo). Kaj diris Reĝo Lir: “Venos Nenio el Nenio”. Aŭ Thomas Berry: “Nenio estas tute si mem, sen ĉio alia”. Humure diris Jean Anouilh: “Morto estas Nenio, do komencu per esti vivanta”. Tio estas malpli ĝoja kaj daŭras pli longe. Nun, kiel oni interpretas Nenion dependas ĉu oni estas optimisto aŭ pesimisto. Pesimisto pensus: Nenio estas negativa afero, do ne gravas.

Sed, estante optimisto, mi provos montri: - ke Nenio estas tre grava kaj nepre ne negativa afero.

Ni komencu per ĈIUTAGA VIVO. Cindrulino sidas ĉe la fajro, malĝoja ĉar ŝi ne povas iri al la balo. “Mi havas Nenion por surporti” ŝi diris al si. Sed ŝi ne intencis diri, ke ŝi iros NUDA al la balo, nur ke ŝi ne havas belan robon.

Aŭ imagu: Patrino en kuirejo kaj infano en sidĉambro, tute silenta. Ŝi krias: “Kion vi faras tie”

“Nenion,” diras li.

Sed kiam Patrino iras vidi, ŝi trovas ĥaoson – Komputilo rompita, trikado malimplikita, infano tiranta voston de la kato. Nun, se ŝi batetas lin, li diros:

“Tio ne estas justa. Mi faris Nenion”.

Aŭ, vespero de tago de Sankta Valentino. Edzino preparas bongustan manĝaĵon. Edzo alvenas malfrue. “Kie vi estis?” Ŝi demandas. Li respondis: “Mi renkontis amikinojn”. Ŝi: “Kaj kion vi du faris?” Li: “Absolute Nenion. Ŝi signifas Nenion al mi. Okazis Nenio”.

La edzino estas silenta. Nun, nek li nek ŝi vere intencis diri “Nenion” vere.

Nun, okazis tiuj eventoj dum la tago, sed nokte estus pli bone ,

ĉar en la malhelo oni povas vidi nenion, ĉu ne? Nu. Mi scias tion, ĉar mi spertis ĝin: Nia filo Ruairi, kiam li estis kvaraĝa, vekigis iun nokton kun timo kaj ekkriegis. Mi iris vidi kio okazas. Li diris: “Estas io sur la lito kaj mi timas ĝin”.

Mi rigardis kaj konsolis lin, dirante: “Estas nenio tie”.

“O, O, O, forigu tion Nenion”, li diris, kaj ne dormis, ĝis mi forigis la Nenion.

Do, Nenio signifas Neni-aĵo, ĉu ne? Io netuŝebla, supozeble. Sed, kio pri Kono, Humoro, Amo? Ĉar ni ne povas tuŝi ilin, ĉu estas ili neniaĵoj, negravaj? Kaj kio pri Songoj, Pensoj, aŭ Dio?

Ni provu fari la aferon pli komprenebla: Do, kio estas truo? Ĉu vi povas difini ĝin? Aŭ desegni ĝin? Eble Nenio ĉirkaŭita de io. Sed, truo estas io ĉu ne? - ne nur la eĝo, sed ankaŭ, kio estas ene. Aŭ imagu muson, kiu vidas fromaĝon. Inter muso kaj fromaĝo estas - Nenio, aŭ se vi preferas, spaco. Nun, forviŝu muson kaj fromaĝon per magio. Kio restas? Nenio? Sed la imago restas en via menso, ĉu ne?



Nu, ni provu ion alian. Muziko kaj Nenio. En muziko, Nenio estas tre grava. Muziko estas farita de Sonoj kaj Silencoj. En 1792 estis la kutimo ĉeesti koncertojn, sed la ĉeestantoj kelkfoje ne interesiĝis pri la muziko kaj eĉ ekdormis dum la koncerto. Haydn volis fari ion pri tio. Li verkis simfonion kun bela melodio, poste Silento, poste BANG KRAŜ!!!! Ĉiu vekigis. Oni nomas tiun simfonion ‘La Surprizo’.

① muziko



Alia Koncerto okazis en NovJorko. John Cage iris al piano kiu troviĝis sur platformo en krucvojo. Li malfermis la pianon, sidis dum kvar minutoj, kaj poste fermis la pianon kaj foriris. Li volis montri la valoron de aŭskulti Nenion.

② akordo (tallying)



= 5

Nun pri matematiko kaj Nenio. Matematikaj simboloj eble komenciĝis per Akordo (angle: tallying) sur noĉbastonoj. Pensu pri voĉdonado hodiaŭ. La Romanoj estas famaj pri organizado – stratoj, ktp. Sed pensu kiel malfacile estus kalkuli, organizi, mezuri sen Nulo (kiu estas specio de Nenio, ĉu ne?). Ni scias ke la Romanoj uzis L por 50 (kvindek), kaj C por cent kaj ktp, sed ĉu vi scias kiel ili skribis ses mil, aŭ ses milionoj, aŭ du mil ok, aŭ la rapideco de la lumo aŭ tri cent mil?

③ romanaj numeroj



Vojmontrilo

Pensu pri la kompatinda centuriestro. Li zorgis pri cent soldatoj kaj ĉiun tagon devas fari raporton. La soldatoj marŝas antaŭ li, dum li kalkulas kiom da li havas. La unuan tagon li havas cent. Dum la nokto soldato fuĝis, do nun restas naŭdek unu. Kiel li skribos tion? Laŭ la regulo 'unu antaŭ V' egalas unu subtrahita de kvin, do kvar. Ĉu ni do skribu IC, aŭ LXXXIX, aŭ (korekta) XCIX?

La trian tagon okazis batalo kaj mortis dudek. Do; XCIX, subtrahu XX - egalas CI (malĝusta). Aŭ subtrahu XX de LXXXIX - ? - LXXXI?

Kaj pri multipliko kaj divido?

Dume —

En la sepa jarcento de nia epoko, vivis hinduo. Li malkovris la koncepton Nenio (nulo). Iom post iom, la hinduaj numeraloj alvenis

la Mezorionton kaj estis bonvenigitaj de la Islamanoj. Pro tio, ni nomas ilin 'arabaj numeraloj'. Poste, Leonardo Fibonacci portis ilin al Eŭropo. Li lernis pri ili dum li vivis en Alĝerio, kie la patro estis oficiro dogana. En 1202, li skribis libron kun la titolo: Liber Abaci ("libro de la abako"), Sed, tiuj kiuj laboris kun abakoj timis ke ili perdos la postenon, ĉar ili vidis ke la araba sistemo estis kiel la abako, sed kun nomoj kaj signoj. Plie, la libro de Fibonacci aperis, kiam la kruckavaliroj batalis kontraŭ Islamo. Do diris la pastroj ke tiuj numeraloj estas laboro de la diablo, ĉar ili estas tiel sagacaj kaj inĝeniaj. Estis nur je la fino de la dekkvina jarcento, ke la romanaj numeroj ne tiom estis uzataj, kaj eĉ tiam, la afero malrapidiĝis.

Do, refoje al Nenio. Kiel diris Isaac Azimov: "Nenio signifas io". (angle: Nothing counts*). Aŭ, kiel diris Alex Bellos (kiu verkis Aventuroj en Numerolando): "Kiam oni parolas pri kalkulado, Nenio faras la tutan diferencon". Pripensu la numeron ses mil (6000); ĉu tio estas: Ses da nenio aŭ ses kaj tri nenioj? Aŭ, provu telefoni sen uzi Nenion: vi neniam povos kontakti viajn amikojn. Kaj la telefonaj instancoj certe preferas ricevi ses cent pundojn ol ses kun Nenio dufoje!

Sed nun pri Nenio kaj Fiziko. Prenas fizikisto malplenan botelon (aŭ diru, botelo kun Nenio en ĝi.) Li pasigas multe da tempo eltirante aŭ ekstraktante tiun Nenion por pruvi ke estas Nenio en ĝi! Li nomigas tion Vakuon. Al li, Nenio devas esti grava afero, aŭ li ne pasigus tiom da tempo forviŝante ĝin! Sed eble la plej grava estas Kosmologio kaj Nenio. Ni ofte aŭdas pri La Granda Eksplodo (Big Bang) per kiu komenciĝis Tuto. Estis Nenio, kaj ĝi eksplodis! Kaj

(4)

$$\overline{\sqrt{1}} = 6,000$$

$$\overline{\sqrt{1m}} = 6,000,000$$

$$MMVIII = 2008$$

$$\overline{CCC} = 300,000$$

ekkomenciĝis la Universo, kaj Spaco kaj Tempo kaj ni...

Sed ne estas facile imagi la universon en nenio. Kiel reprezentation?

Kaj ĉu nia universo estiĝis, kreskis, poste malkreskis ĝis maleksplodo, kaj reeksplodos ĝis infinito? Ekzistas Tibeta mito, kiu diras: Kiam Nenio ekzistis, naskiĝis du lumoj. Lumo nigra – Mizero. Kaj lumo blanka – Brileco. El ĥaoso aperis kvin multkoloraj riveroj de lumo, kiuj separiĝis kiel ĉielarko. El la kvin riveroj venis: Malmolo, fluideco, varmecoj, movado, spaco. Ili kuniĝis kaj formis grandegan ovon. Mizero nigra produktis el la ovo la malhelo de neesto, kaj plenigis la malhelon per pesto, malbonŝanco, sekeco, sufero kaj multaj demonoj. Sed Brileco plenigis la mondon per: ĝojo, viveco, prospero, longa vivo kaj aliaj bonaĵoj.

Sed refoje al kosmologio; kaj nia mito pri ĝi. Oni diras ke nia universo estas svarmanta amaso de partikuloj infinitezimaj, kiu ekzistas, poste ne ekzistas ree kaj ree, ĉiam ŝanĝiĝantaj. Do kelkfoje estas io, kelkfoje nenio, simila al tiu kato de Schroedinger, kiu ne sciis ĉu li ekzistis aŭ ne, ĝis iu malfermis la skatolon kaj vidis lin.

Iam oni kredis ke atomo estis la plej malgranda aĵo en la universo (atomo signifas nedividebla). Sed irlanda sciencisto Walton kaj angla, Cockcroft prenis unu atomon de litio, kiu havas du protonojn, kaj post multe da ĝeno, sukcesis spliti la atomon en du partoj, do pruvis, ke la grekoj malpravas. (Do ĉu ni nomigu ĝin 'tomo' anstataŭ a-tomo?)

Tiu eksperimento samtempe pruvis la faman ekvacion de Einstein, $e = mc^2$. Tio vere signifas ke energio estas materio, kaj materio, energio, do ni diru: io estas Nenio kaj Nenio estas io!

La sciencistoj pesis la atomon de litio antaŭ la eksperimento (ni diru dudek unuoj) sed ho! Post la eksperimento, ĉiuj el la splititaj protonoj pezis: diru, 8 kaj ok. Sed ok kaj ok ne egalas dudek! Do kio pri la kvar kiu mankis? Ĉu kvar Nenioj? Ili estas energio.

Fine mi ne intencas priskribi ekzakte ke ekzistas en la universo – hela materialo kaj malhela, hela energio kaj malhela ktp, sed:

Se la astronomoj pravas: Okdek kvin por cento de la tuta materio en la universo estas malhela materio. Kaj malhela energio estas ĝis nun nekalkulebla.

Kaj nun ili trovis Grandegan Malplenon kaj ne scias kiu speco de Nenio estas tio!

Do, ne diru al mi ke Nenio estas nur nenio.

Ĉar verŝajne Nenio estas tre grava afero.

Kiel diris Philip Larkin,

'Nenio, kiel io, okazas ĉie.'

*En la angla la verbo 'counts' havas la signifojn 'kalkulas aŭ kalkuliĝas', sed ĝi ankaŭ havas la signifon 'gravas'. Red.

Vizito al Pollando: Sheila Henderson

Mi ĉeestis internacian esperantan Ferion en Karpacz en 1998. Unue, mi komencis mian vojaĝon el Motherwell Stacidomo, kie mi trafis vagonaron al Londono kaj tie mi tranoktis. La venontan tagon mi devis trafi veturilon en Londono Victoria aŭtobus-stacio al Zielona Góra, Pollando. Antaŭ ol mi alvenis en Pollandon, mi trapasis kvar landojn – Francion, Belgion, Nederlandon kaj Germanion.

Kiam mi alvenis en Zielona Góra, Eric Walker, kiu organizis la ferion, renkontis min kun malnova aŭtobuso por finfine veturigi min al Karpacz. Ĉi tiu vojaĝo okupis ĉirkaŭ du horojn. Entute, la vojaĝo inter Londono kaj Karpacz okupis almenaŭ unu nokton kaj ankaŭ pluan tagon.

Dum mia restado en Karpacz mi partoprenis en tre interesa ekskurso al Śnieżka en Karkonoska Nacia Parko. Unue, mi devis trafi lokan ĝis mi atingis la ĉirkaŭaĵon de la Nacia Parko. Poste, mi promenis en la parko kaj de tie me trafis seĝotelferon por atingi la pinton de monto Śnieżka. Bedaŭrinde, la seĝotelfero nur portis min ĝis la meza distanco de la pinto kaj tiam mi devis eliri el la seĝotelfero kaj promenadi per kruda vojo ĝis la mont-pinto.

Kiam mi estis en Karpacz mi denove renkontis Miran, pola virino, kiun Anne Ayre gastigis dum la Brita Kongreso en Hamiltono. Fakte, ŝi restis en Karpacz survoje hejmen post la Universala Kongreso en Montpellier. Estis surprizo por mi revidi ŝin en Karpacz.

Karpacz estis malgranda, interesa loko kun belaj ĉirkaŭaĵoj kaj multaj arboj. Ĝi estis en la regiono de Silezio.

Dum mia restado en Karpacz mi renkontis alian Mirian, ankaŭ pola virino kun kiu mi nun korespondas kaj ŝi sendis al mi foton de ŝia geedziĝ-festo.

Entute mi ĝuis mian restadon en Karpacz, sed mi ne volas ripeti la longan aŭtobus-vojaĝon.

Howard Phillips Lovecraft: Donald Robertson

20a de aŭgusto 1890 – 15a de marto 1937

Antaŭ kelkaj jaroj, dum mi rigardis Kindle-librojn en Amazon, mi hazarde vidis la verkojn de Howard Phillips Lovecraft kaj ial sentis devigata elŝuti liajn romanojn.

Lovecraft naskiĝis en Providence, Rhode Island, en Usono la dudekan de aŭgusto mil okcent naŭdek. Li estis malsana infano kaj apenaŭ partoprenis lernejon ĝis la aĝo de ok jaroj kaj li tiam foriris post unu jaro. Dum tiu tempo li legis multon kaj tre interesiĝis pri kemio kaj astronomio. En mil okcent naŭdek naŭ li publikigis artikolojn en la Scienca Gazeto kaj kvar jarojn poste, li revenis al publika lernejo.

En la frua vivo Lovecraft kredis ke li estas atakata de tio, kion li nomis Noktaj Magruloj (angle: Night Gaunts), malofta formo de parasomnio*, aŭ noktaj teruroj, kaj li opiniis ke multaj el liaj postaj verkoj estis inspiritaj de tiuj spertoj.

Plenkreskinte Lovecraft iĝis verkisto de mallongaj rakontoj, redaktoro, verkisto kaj poeto. Lovecraft estis fekunda en sia skribado kaj estis konsiderata unu el la plej grandaj usonaj aŭtoroj kaj kompareblis kun tiaj, kiaj Edgar Allan Poe.

La ĝenro de liaj verkoj konsistis el hororo, scienca fikcio, fantazio, kaj stranga kaj gotika fikcioj. La gvida principo de Lovecraft estis tio, kion li nomis Kosmismo – la ideo ke la vivo estas nekomprenebla por la homa menso, kaj liaj rakontoj esprimas profundan indiferenton al homaj kredoj kaj aferoj.

Mi ne elektis individuajn historiojn de la menuo, sed eklegis de la komenco de liaj verkoj kaj daŭris ĝis la fino. Mi trovis ĝin stranga sperto. Ekzemplo de la stilo de Lovecraft povas vidiĝi en lia historio “La Tombo”, verkita en 1917. La rakonto temas pri iu Jervas Dudley, kiu estas riĉa revemulo, viziulo, kaj laŭ temperamento ne bone taŭga por normala vivo kaj socio. Li pasigis sian tempon leganta

antikvajn librojn kaj malmulte konatajn librojn, kaj vaganta tra la kampoj kaj boskoj de la regiono. Li skribas pri arbaraj truoj, krepuskaj abismoj, musko-kovritaj deklivoj kaj torditaj kverkoj, kaj tiel, en tiu atmosfero, konatiĝas kun la Driadoj de la arboj kaj observas ties sovaĝajn dancojn en la radioj de la malkreskanta lumo. Daŭrante en tiu ĉi maniero li priskribis la solecan tombon de antikva familio en la plej malluma montetoflanka densejo. Li skribas pri la volbo en la sama tono kaj per tiu ĉi metodo kreas bildon de mistero, hororo kaj malbono, kiuj trapenetas ĉiujn aliajn rakontojn de Lovecraft.

Mi bezonis sufiĉe longan tempon por legi la tutan verkaron kiun mi elŝutis, kaj kiam mi finis, mi trovis min kun stranga sento de maltrankvileco kiu bezonis iom da tempo por forlasi min. Multo estas skribita pri la vivo de Lovecraft kaj mi ne rimarkis ĉi tion ĝis mi finis mian legadon de liaj verkoj. Mi ne sciis ke kulto pri li estis kreita de la legantoj de liaj verkoj kaj ke liaj skribaĵoj estis taksataj serioze. Estas multe kion oni povus diri pri Lovecraft, sed ĝi bezonus tro da tempo, kaj tro ŝarĝus miajn fortojn. Mi nur diras, ke por ĉiuj kiuj ĝuas la strangan kaj mirindan, legu la verkojn de Lovecraft kaj vi ne estos seniluziigita.

* Parasomnioj estas kategorio de dormaj malfunkcioj kiuj inkluzivas nenormalajn movojn, kondutojn, emociojn, perceptojn, kaj sonĝojn.

La Vie Est Belle: Hju Rid

Legomaj Semoj de Queens

Karoto: Vario: St Valery

Aldonu guston kaj koloron al stufoj kaj dolĉon al salatoj per karotoj de St Valery. La vario St Valery havas klasikan konusan formon kaj kreskas ĝis 30 cm. Ĝian riĉan dolĉan guston ŝatas karotamantoj tra la mondo.

Semtempo

Frua printempo. En mildaj klimatoj, malfrua somero kaj eble tuta vintro.

Sem-metodo

La semojn de karoto St Valery de Queens disĵetu egale en malprofundajn liniojn, apartajn je 30 cm, en drenebla grundo kun tut-taga sunluma. Antaŭspatumu la grundon ĝis 20 cm kaj enfosigu 10 cm da kompoŝto aŭ da sterko. Ebenigu la grundon antaŭ ol krei liniojn per sarkilo aŭ per bastono. Nutru regule per grasumo riĉa je nitrogeno. Ostaĵo estas ideala. Maldensigi la ŝosojn kiam ili altas ĉirkaŭ 5 cm.

Rikolto

Oni povas rikolti la karotojn St Valery de Queens kiam la junaj karotoj longas kiel fingroj. Oni povas lasi ilin engrundaj kovritaj per maldika tavolo da mulĉo ĝis vintro. Rikoltu per ĝardena forko kaj evitu difekti la karotojn.

Li remetis la semopakaĵon sur la breton kaj staris kun senesprima rigardo, ne sciante kion fari. Ĝardeniloj kuŝis en la melhelaj anguloj de la kabano, multaj kun sekiĝinta grundo sur la stangoj, la dentoj, kaj la klingoj. Li paŝis eksteren kaj staris, sola figuro fiksrigardanta al nenio konkreta, kun kurba dorso kaj klinita kapo.

Maldikaj trudherboj kovris la legoman angulon de la granda ĝardeno. Altaj tigoj de senecio kaj tro-kreskinta artiŝoko kliniĝis super humida grundo. Ĝardeno forko staris en la grundo tie, kie oni lasis ĝin. La mallarĝaj lignaj tabuloj kiuj dividis la bedon en malpli grandajn areojn, kaj ebligis al lia edzino aliron sen stari sur mola grundo, apenaŭ videblis sub flav-verdaj folioj kaj tigoj.

Birdokantoj laŭtis, preskaŭ surdiga bruo – tiom da energio dum la morto de fruvintro. Li rigardis supren al nudaj arboj. Nigraj bronkoj gravuritaj sur cindrokolorajn nubojn. Li turnis sin kaj piediris al sia apartamento. Neĝo kuŝis tie kaj tie sur herbotufoj inter nigriĝantaj fagofolioj.

Oni devas rasti tiujn, li pensis.

La salono estis varma kaj kiam li revenis; neniuj gastoj restis. Malplenaj te-tasoj kaj teleroj kuŝis sur la tablo, iuj sur seĝoj kaj seĝobrakoj. Li povus sidi nun por pensi aŭ revi. Lia korpo postulis ripozon. Lacego tiris liajn membrojn. Sed tio ne estis la ĝusta maniero. Ne tiel oni agas. La vivantoj vivas. Ili alportas ordon kaj strukturon. Ili purigas kaj aranĝas, ili polvumas kaj netigas. Ili forbaras putriĝon.

Do li iris ĉirkaŭ la ĉambro, kaj levis tasojn, subtasojn. Li levis tranĉilon de sur la tapiŝo, kaj portis ĉion en la kuirejon, plenigis la telerlavilon, metis kapsulon en la ujon, fermis la pordon, kaj premis la “ON” butonon. Li prenis rubujan sakon kaj enmetis paperajn tukojn kaj kovrilojn de bonbonoj. Li malplenigis cindruojn kaj, hezitante nur sekundon, ĵetis ankaŭ en la sakon la cindruojn. Tiuj disĵetis tabakon kaj stumpojn dum ili falis.

Li levis kelkajn malpurajn vestojn el vestokorbo, metis en la lavaŝinon, mezuris pulvoron kaj ŝtofmoligilon, elektis taŭgan ciklon kaj premis “START”. Li senpolvigis kaj suĉilumis, kaj kiam finiĝis la lavociklo li pendigis la vestojn sur radiatoroj rako por sekiĝo.

La sekvan tagon li malplenigis la vestoŝrankon kaj ordigis vestojn, iujn por forĵeto, iujn por bonfaraj butikoj. Ĉiu ĉemizo aŭ bluzo blovetis sugesteton de “La Vie Est Belle” de Lancôme kiam li ŝovis ĝin en la nigran rubujan sakon. Ŝi petis ĝin kiel naskiĝdonacon ĉar plaĉis al ŝi la nomo. Li suĉilumis denove, kuiris tagmanĝon kaj pensis pri aliaj aferoj farendaj. Nur kiam restis al li la taskoj kiuj devis atendi la ĝustan horon, nur tiam li formetis la kondolencajn kartojn kaj ĵetis ilin en la recikligan ujon.

Kelkajn tagojn poste la najbaroj vizitis lin.

“Kiel vi fartas, Doug?” diris Jack Liddell, kaj proponis sian manon. Jack estis lia najbaro ekde la tago kiam li transloĝiĝis en la vilaĝon. Ili helpadis unu la aliajn en krizetoj dum la jaroj.

“Oĥ, vi vidas, mi okupigas min per taskoj,” li diris, “sed envenu”.

“Mi alportis por vi stekan torton, Doug, kaj tofeajn skonojn kiujn mi bakis. Vi ŝatos ilin,” diris la Mary Liddell, la edzino de Jack.

“Ho, ne necesis, Mary, mi fartas, nu, enorde,” li diris, “Vere. Sed envenu”.

Li enportis pleton, kun la skonoj kaj poto de teo “Earl Grey”, en la salonon kaj sidis kun la najbaroj. Konversacio estis facila. Ili estis malnovaj amikoj. Ne nepris mencii la perdon de Doug, nek eviti ĝin. Ili babilis kvazaŭ dum normala tago, eble iomete pli kviete, eble pli milde. Finfine la temo de la Ĝardena Konkurso leviĝis.

“Mankos al ni la kontribuoj de Janet en hortikultura, Doug,” diris Mary, “Ŝi ĉiam gajnis ion”.

“La legoma angulo estis ŝia amo, Mary,” li diris, “Ŝi ĉiam faris ion se la vetero sekus. Ha! Ŝia angulo, ni nomis ĝin. Ĝi estas enorma!”

Kaj ili ridis. La dolĉa rido de karaj amikoj.

“Ĉu vi mem kontribuos venontjare?” demandis Mary.

“Ho Dio! Ne, Mary, mi ne. Mi estas nenia ĝardenisto. Mi malamegas ĝardenumon. Mi devas kulposenti ĉar mi lasis tion al ŝi. Sed ĝi estis ŝia plezuro. Vi scias tion. Ŝi amis vidi la kreskon de vivo”.

“Prave. Nu, vidu, ni foriru nun. Ni fakte vizitis por demandi ĉu vi volus veni al la nia por Kristnasko, tiel ke vi ne estu sola”.

“Kiel afable! Jes, mi venos, se vi estas certaj ke vi volas”.

“Ni estas certaj”.

... Fragaj plantoj prezentas fruktojn ĝis kvin aŭ ses jaroj. Sed post la unuaj du jaroj la rikoltoj iĝos malpli grandaj kaj povas okazi kresko de damaĝbestoj kaj malsanoj . . .

Ĝardenado ĉe BBC – Gvidlinioj

Taskoj en malgranda apartamento kun regula atento baldaŭ elĉerpiĝas. Fenestroj purigendaj malmultas, ankaŭ kurtenoj. Kiam oni forigas ne deziritajn plantojn kaj ornamaĵojn, senpolvigo fariĝas pli facila. Riparendaĵoj, jam riparitaj restas riparitaj.

Sed prefere ol trovi sin senokupata li turnis sin, eĉ dum la ŝrumpiĝantaj vintraj tagoj, al la ĝardeno kaj la legoma angulo.

Li ordigis la kabanon, purigis la ilojn, kaj stakis ilin laŭorde sur la bretojn aŭ pendigis ilin de hokoj en muro. Li rastis la fagofoliojn kaj metis ilin en lastatempe akiritan dratmaŝan ujon. Li skrapis muskon de la dividaj tabuloj kaj fortiris trudherbojn el ĉiuj bedetoj. Li kolektis mortajn branĉojn kaj heĝotranĉaĵojn, kiuj kuŝis senatente jam de la somero, kaj bruligis rubofajron.

Ĉirkaŭ tiu ĉi tempo Janet komencis aperi en liaj sonĝoj, plej verŝajne pro la multaj horoj kiujn li pasigis en la ĝardeno. Ne pre estas printempo. Ŝi staras ĉe la maldekstro de la fraga bedo kaj ĉiam rigardas lin per la konata mieno, duon-demanda, duon-ordona. Nur rigardas.

Sed sonĝoj estas fantazioj; la ĉiutaga gravas; li devas daŭrigi la vivon.

Iun tagon, kiam li finforigis la trudherbojn kaj mortajn plantojn, li trovis linion de nete tranĉitaj stumpoj. Kiam li revenis en la apartamenton, li serĉis la reton kaj konstatis ke ĉi tiuj estis la fragaj plantoj kiujn Janet engrundigis la antaŭan jaron. Tondeti ilin estis la lasta tasko kiun ŝi faris antaŭ ol ŝi malsaniĝis.

... Grundo sterkita la antaŭan jaron provizas idealan

komencon por viaj fragoplantoj. Tia grundo bezonos aldonon da ĝardena kompoŝto po unu ĉarumo por 4 m², plus po 75g por 1 m² kaj da ostosterko kaj da fukosterko ...

www.gardenorganic.org.uk

Je decembro la ĝardeno estis en perfekta stato. Li ŝatis la netecon de la randoj kiujn li liniigis, kaj la malhelan brunon de la sen-trudherba grundo. La heĝojn li tondis ĝis la maksimumo kiun li pretis riski. Se li vidus solan fagofolion li piedirus ĉirkaŭ la perimetro por levi ĝin. Foje li staris, admiranta kion li faris. Li devis konfesi al si ke certa kontentigo troviĝas en la laboro, kaj li enspiras profunde por poste suspiri. Sed liaj okuloj ofte vagis al la siluetoj de arbobranĉoj, nigraj kontraŭ la griza ĉielo, dividiĝantaj kaj apartiĝantaj por dividi denove. Tiam la kapo ofte falis kaj li turnis sin reire al la apartamento.

Kiam Kristnasko alvenis, li ankoraŭ ne faris ĉion ĉi pro amo de ĝardenumo.

“Do vi provos la Ĝardenan Konkurson?” diris Mary kun impertinenta rideto dum la kristnaska bankedo, “La ĝardeno aspektas en bonordo”.

“Entute ne,” li diris, “mi nur provas teni ĝin neta, kaj teni min okupata”.

“Ĝi aspektas bonege,” diris Jack, “vi rajtas salteti trans la heĝo por fari la mian”.

“Eble mi faros,” li diris.

“Ho Dio, ne! Mi ŝercis je vi,” diris Jack, “mi incitetis, homo”.

La tago pasis sufiĉe facile. La du plenkreskaj gefiloj de la najbaroj kun ties junaj familioj ĉeestis. Konversacio umis ĉirkaŭ li. Oni lasis

lin en liaj pensoj kiam li ne emis kontribui. Venis vespero kaj la gejunuloj pretigis sin por foriri. Oni trovis mantelojn kaj enŝovis plendantajn infanojn enen. Malvarma aero ruliĝis en la salonon kiam unue unu familio kaj poste la alia staris ĉe la malferma pordo por diri siajn ĝisojn. Dum ĉio ĉi okazadis li sidis, viskio enmane, apud Frank Smith, maljuna najbaro. Ili babilis kviete pri la ĵusa tago kaj sciigis unu la alian pri vilaĝaj aferoj okazintaj dumtempe ekde ilia lasta babilo. Frank konis ĉiujn malnovajn familiojn de la vilaĝo kaj ĉiam tenis preta la orelon por kapti klaĉon. Li ankaŭ enhavis malican emon.

“Mary opinias ke vi kontribuos ĉi-jare, Doug”.

“Vi aŭdis min, Frank, mi nur tenas min okupata”.

“Ha, nu, estas bone tion fari. Estas entute bone”.

“Jen ĉio kion mi povas fari, Frank, estas ankoraŭ tro frue, vi komprenas”.

“Mi scias, knabo, mi scias. Vi aŭdis pri Davidson, tamen?”

“Ne, mi ne. Sed se mi aŭdas ties nomon, ne povas esti bone”.

“Ha, nu, ne. Li dis-sciigas ke li gajnos la superan premion en hortikultura. Entuta, vi komprenas, de ĉiuj kategorioj”.

“Ĉu vere?”

“Jes, ĉar li ne plu frontas seriozan konkursanton”.

Mary revenis en la salonon.

“Kiel ni statas pri trinkoj?” ŝi diris.

Li stariĝis kaj piediris preter ŝi, skuante la kapon. Kiam li revenis en la salonon li portis sian mantelon.

“Ĉu vi iras nun, Doug? Ĉu vi ne restos pli longe?”

“Ne, mi lacas. Ne nepras ĝisi min ĉeporde,” li diris kaj foriris.

En sia apartamento li estis fulme furiozega. Li malbenis Frank, li malbenis Davidson. Li pugnigis la manon kaj ĉirkaŭrigardis, serĉante ion por bati. Li genuis sur la kanapo kaj frapegis ĝian dorson per plena forto. Ĝiaj piedoj leviĝis kaj skrapis la plankon laŭte. Embarasite li haltis. Tuj poste li memoris ke la suba najbaro feriiis dum la periodo. Neniu povis aŭdi lin. Do li kriegis plenvoĉe. Forfikiĝu, forfikiĝu, forfikiĝu. Dio damnu vin, vi ne gajnos. Diodamne, bastardo, mi certigos tion. Vi devos min venki ĉi-jare, bastardo. Forfikiĝu, forfikiĝu, forfikiĝu.

La sekvan tagon li komencis sian planon. Li esploris rete, li aĉetis librojn pri la kultivado de fragoj. Li mendis fragajn plantojn; F1 hibridojn, kaj ne-hibridajn variojn. En la nova jaro li aniĝis en la ĝardenuman klubon en la apuda urbo. Li fariĝis diligentega en la studo de fragokultivo. Li kreis kalkultabelon de ĝardenaj taskoj: la tempofenestro por renversi la grundon; kiam plej efike ĵeti sterkon; kiam mulĉumi. Dum la vintro retretis, li dediĉis pli da tempo al la ĝardeno, regule kontrolante kontraŭ damaĝbestoj, eltirante trudherbojn je la unua apero. Ofte li simple staris, pensis, planis. Ĉe la paso de ĉiu semajno kaj monato, lia furiozo kvietiĝis. Nur foje, kiam li ekmemoris la konversacion de Kristnasko-tago, li sentis la koleron leviĝi. Plej ofte li ne plu sentis amaron. Do kial li faradas tion ĉi, li scivolis, kio logas lin fidele al la ĝardeno?

En frua printempo, kiel flanka ideo, li fosis linion maldekstre de la fraga bedo. Li malfermis la paketon de karotosemoj kiun li trovis en la kabano dum novembro, semis ilin kaj zorge kovris ilin per grundo.

La sonĝoj daŭris, unu fojon, eble du fojojn en semajno. Ĉiam kun la sama mieno. Unu nokton en marto, sonĝante ke li ploras, li vekigis. Li estis sola en la ĉambro sed li povis senti, ho, ion. La posta spuro de Lancôme? Li levis sin, surmetis sian banrobon kaj pantoflojn. Li iris al la salono kaj staris antaŭ la kamena breto kie li hezitis nur dum sekundo. Poste li levis la ujon kaj portis ĝin suben. Estis malhelege ekstere kaj li dependis de sia memoro de multaj tiaj vojaĝoj por sekvi la ĝardenan padon. Kiam li piediris la ĝustan laŭ

sia takso distancon li elverŝis la enhavojn, ĵetante ilin en la malhelon. Ili falis kaj lasis fantoman spuron sur la grundo.

“Adiaŭ,” li flustris. Poste li turniĝis kaj direktis sin al la lito.

Dum progresis printempo, burĝonoj ŝveliĝis ĉe la pintoj de nigraj branĉoj, kiel alveoloj ĉe la pinto de bronketoj, kaj li rimarkis ke lia koro malstreĉiĝis por la unua fojo. Laodoro de la vento ŝanĝiĝis – ĝi iĝis pli freŝa kaj kuraĝoplena. Kiam li renkontis amikojn, videblis sincera ĝojo malantaŭ lia rideto. Li pli emis komenci konversaciojn kaj daŭrigi ilin. Ĉagreno finfine degelis.

“Mi vidis vian nomon en la listo de kandidatoj pasintan semajnon,” diris Mary. Ŝi staris la ĉe la alia flanko de la divida heĝo, al kiu ŝi alproksimiĝis dum li kontrolis siajn novajn plantojn pro afidoj kaj limakoj. “Via angulo aspektas bonege, Doug. Ĉu vi tamen akiris ŝaton pri ĝardenumado?”

Li rektigis sin kaj ridetis. Li streĉis la dorson antaŭ ol respondi.

“Ĝi endas nur, Mary. Ĝi estas nur tasko kiu endas”.

“Do kial vi kandidatiĝis?”

“Nu, tio ankaŭ endas”.

“Okej. Nu. Enorde. Mi supozas ke jes. En kiujn kategoriojn?”

“Fragoj. Mi havas kvin variojn kiuj kreskas, ĉiuj ne-hibridoj. Tiuj bezonas la plejan zorgon tamen, sed plej bonguste rezultiĝos. Nu, laŭ la libroj. Mi ankaŭ havas pli maljunajn plantojn kiujn Janet engrundigis”.

“Vi havas librojn?”

Li ridetis antaŭ ol respondi.

“Mi havas librojn. Ho, kaj mi prezentos ankaŭ karotojn. Mi trovis semopaketon de Janet, do mi pensis 'kial ne?'”.

“Sed fragoj, tamen? Vi scias ke Jack ĉiam prezentis siajn. Vi

konkursos kontraŭ li ĉi-jare”.

“Ne temas pri venko super Jack, Mary. Fakte male. Se li gajnos anstataŭ mi, same bona rezulto.”

Je la tago de la konkurso, venis Mary por helpi lin porti liajn fragojn kaj karotojn al la vilaĝa domo. Li jam sternis lignajn skatolojn tegitajn per pajlo kaj kovritajn per bruna papero sur la salona planko.

“Ni sukcesos per unu iro, ĉu?” li diris.

“Certe, jes”.

Mary turnis sin por levi la unuan skatolon kaj frontis al la kameno.

“Kie estas Janet?”

Mary levis siajn manojn al la vangoj. “Mi pardonpetas, Doug. Mi pardonpetegas. Mi volis diri kie estas la urno?”

Li swingis la manon trankvilige.

“Disĵetita, Mary. Mi faris private. Ĉirkaŭ marto, laŭmemore”.

“Kun familio?”

“Ne. Nur mi kaj Janet. Nu, tio kio restis en la urno. Nur ostosterko vere”.

“Pardonon?”

“Ho, vidu, Mary, mi ne estas sentimentala, ne tiamaniere. Janet forpasis antaŭ preskaŭ jaro, kaj retenis la kremaciaĵojn estis neniam komforto por mi. Iom male, fakte”.

Ĝis frua posttagmezo la juĝado finiĝis kaj Jack ŝajnis malgaja. La fragoj de Davidson aspektis belegaj kaj la juĝistojn ŝajne imponis, kiam tiuj gustumis ilin.

“Davidson sukcesos ĉi-jare, Doug”.

Li vidis la ridetaĉon de Davidson kaj malbenis silente. Kiam oni anoncis ties sukceson li eliris el la halo. Li ne pretis permesi al Davidson, aŭ al aliaj, vidi lian furiozon. Sed ne longe post, Jack vokis lin reveni en la domon por aŭdi la rezultojn de la legoma kategorio. Estis ekscito en la halo. Kiam li staris apud Jack, kelkaj homoj turnis la kapojn kaj flustris inter si. Io okazas.

La prezidantino de la juĝa ĵurio tusetis por ebligi la voĉon kaj gestis ke oni silentu.

“Kaj venkanto por plej bonaj legomoj, karaj gesinjoroj, estas Douglas McIntyre”.

Kio? Ne eblas! Li nur senzorge ĵetis la semojn en la grundon, sen sterko, sen trakto, kiel nenion pli ol flanka penso. Ne povas esti vera. Kaj, se vera, li apenaŭ meritis venkon. Sed en tiu momento, lia humoro ŝanĝiĝis. Subite la halo ŝajnis pli hela kaj li rimarkis kolorojn kaj odorojn, karotojn, pizojn, terpomojn, aranĝitajn per la perfekteco de artisto, sternitajn sur tablojn, florojn en korboj sur fenestrobretoj, la blovetojn de parfumo. Pleje li rimarkis la eksciton en la voĉoj kaj la rigardetojn kaj ridetojn direktatajn al li. Baldaŭ la horo alvenis por anonci la superan premion.

La prezidantino petis silenton denove.

“Kaj finfine, supera venkanto pro superba unua provo en fruktoj, sed precipe pro liaj elstaraj karotoj St Valery, estas Douglas McIntyre. Gratulojn, Douglas”.

La sekvaj kelkaj minutoj estis konfuzo de ridetoj kaj manpremoj kaj manfrapoj je la dorso. Li ekzaltiĝis; li vere ne povis kredi. Sed esti en la atentocentro plaĉus pli al Janet ol al li. Unu-du fojojn, kiam geamikoj manpremis, li imagis ke li ekvidis impreson de la grundo maldekstre de la fraga bedo. Tre baldaŭ lia nura deziro estis forlasi la halon por reiri hejmen. Demando pikis lin.

En la apartamento li serĉis tra la materialo pri hortikulturo kiun li

akumulis, sed ne povis trovi kion li celis. Li iris suben laŭ la ŝtuparo kaj paŝis sur la ĝardenan padon. En la kabano, finfine, post iomete da serĉofoso, li trovis la semopakaĵeton. Ĝi estis makulita kaj ŝrumpita kaj li ne povis legi la preson sur la dorsaĵo. Li hastis eksteren en la taglumon. La makuletoj de melduo jam kovris la plejmulton de la teksto, sed tie, sub Sem-metodo, li povis ankoraŭ deĉifri la idealan sterkon por karotoj St Valery.

“Ne!”

Li ekrigardis al la terpeco maldekstre de la fraga bedo, kaj dum momento la aromo de “La Vie Est Belle” aperis en lia menso. La arboj kiuj ĉirkaŭis la angulon de Janet – la angulon nun de li – estis foliplenaj, la branĉoj kaŝitaj. La ĉielo estis sennuba, la venteto varma. Li ridetis. Profunde li enspiris. Kaj ĵus antaŭ ol suspiri, li sentis tiron en la mentono kaj ĝemo tremis en la brusto. La signifon de la franca nomo li finfine komprenis.

Filisa (Phyllis) Ethel Goodheir (1918 – 2015)

Tradukita el la angla versio verkita de Ingrid, filino de Filisa.

Filisa estis absolute fluparola Esperantisto ĝis la fino de la vivo je la pompa aĝo de 96. Ŝi estis tiel fluparola ke ŝi jam forgesis la afrikansan lingvon kiun ŝi devis lerni por fariĝi intruisto en Sudafriko, ŝia naskolando. Ŝia patro estis misiisto de la Metodista Eklezio kaj ŝi ĉiam fieris diri ke ŝi naskiĝis en Kingwilliamstown en kot-kabano! Ŝi esti unu el 5 gefratoj kaj ofte parolis pri iom sovaĝa kaj ĝuoplena infanaĝo. Post studado en la universitato de Cape Town, ŝi fariĝis instruisto kaj transloĝiĝis al Zimbabwe por esti kun sia fratino kiu ankaŭ instruas sciencon. Sporto kaj klasika muziko estis ŝiaj du grandaj amoj. Ŝi baldaŭ akiris pluan – germanan rifuĝinton nomatan Gunter Haas kun kiu ŝi naskis tri infanoj, Judy, Ingrid, kaj Simon.

Pro la ŝanĝiĝanta politika situacio, la familio forlasis la urbon Harare en 1961 por transloĝiĝi al Coatbridge. Tre baldaŭ okazis frapo sur la pordon far la lernejestro de la lernejo Sankta Patrick, kiu urĝe serĉas instruiston de scienco por la lernantoj de la 1a kaj 2a jaroj. Ŝi amegis tiun laboron, kaj havis rekompencojn jarojn poste pro studentoj, nun mezaĝaj, kiuj rekonis ŝin ĉe Lago Drumpellier kie ŝi ŝatis promeni. Tiuj demandis al ŝi ĉu ŝi memoris la projekton, kiun ili faris pri motorbicikloj kaj elefantoj!!!

Post la finiĝo de la unua geedziĝo per divorco kiam ŝi aĝis en la mez-kvindekaj jaroj, ŝi bonŝance renkontis Alberton kun kiu ŝi tuj simpatiiĝis kaj poste geedziĝis!

Estis Alberto kiu enkondukis ŝin en Esperanton kaj la Kvakerojn. Ŝi ĵetis sin tute verve en ambaŭn kaj baldaŭ la geparo vojaĝadis ĉirkaŭ la mondo por viziti diversajn Esperantajn amikojn, kun kiuj ili korespondadis aŭ kiujn ili renkontis ĉe universalaj kongresoj. Dimanĉe ili regule ĉeestis ĉe Friend's House (la kvakera domo), kie

ambaŭ finfine fariĝis presbiteroj. La skota Esperanto-Studrondo estis ĉiujara ĉefpunkto, kaj Filisa dediĉis enorman libertempon al la loĝistiko de la organizado de tiuj ĉi kunvenoj. Ŝi ankaŭ provizis sin, kiel provaŭdanton, al Alberto por multo el liaj eldonotoj materialoj kaj, krom provlegi, ŝi ofte helpis lin traduki siajn verkojn en la anglan. Super ĉio, ili dividis intensan spiritan senton pri naturo kaj plenaera vagado kaj, longe post la morto de Alberto (preskaŭ 20 jarojn antaŭ ŝia propra), tio ĉi daŭre donis tiom da komforto al Filisa.

Malmultaj homoj scias kiom grava estis la rolo, kiun ludis Filisa por enkonduki 'Living Will' (vivan testamenton) en Brition. Kiam oni diskutis la temon de pasiva eŭtanazio en la Ĉambro de Lordoj antaŭ kelkaj jaroj, ŝi estis la nura ne-kuraciste trejnita persono kiun oni notis en la raporto. Dum la jaroj, ŝi dissendis kaj liveris mensan pacon al miloj da individuoj, kaj ŝia Living Will ankoraŭ funkcias sukcese hodiaŭ. Filisa inspiris multajn homojn – ŝi malofte plendis, ĉiam provis rimarki la pozitivan flankojn en aliaj homoj kaj en si mem, kaj donis tiom al aliaj. Jen pri kio oni memoros ŝin super ĉio – ŝia pozitiva kaj nesuperebla spirito kaj ŝia entuziasmo por vivo. Oni primemoris Filison kelkajn monatojn post ŝia morto per celebros, dimanĉon la 26a de aprilo 2015, ĉe la golfludeja klubo de Drumpellier, kie ŝi ludis golfludon kaj briĝon. Kortuŝis la familion de Filisa la nombro da Esperantistoj kiuj ĉeestis, kaj ja emocius Filison ankaŭ.

Filisa Ethel Goodheir naskiĝis la 28an de junio 1918 kaj mortis la 7an de januaro 2015.

Babilado kun Dio: Anonima (elangligis Ed Robertson)



Iun tagon antaŭnelonge mi renkontis Dion. Mi scias, kion vi pensas. Kiel diable mi sciis, ke temis pri Dio? Nu, mi klarigos post iom, sed esence li konvinkis min, ĉar li havis ĉiujn respondojn, kaj mi vere celas diri **ĈIUJN** respondojn. Ĉiun demandon kiun mi ĵetis al li, li rebatis per kredinda kaj kontentiga respondo. Finfine, estis pli facile akcepti, ke li estas Dio, ol io alia.

Strange estas, ĉar mi ankoraŭ estas ateisto, kaj ni eĉ interkonsentis pri tio! Ĉio komenciĝis en la trajno de 16:20 reen de Reĝina Strato. Trovis por mi agrablan lokon apud fenestro, neniom da kriegantaj infanaĉoj nek ebriaj huliganoj aŭdeblaj. Neniu

poŝtelefono eĉ videblis. Eksidis, komencis legi la ĵurnalon, kaj jen li aperis.

Kiel li aspektis? Nu, ne kiel vi atendus, certe. Li aĝis ĉirkaŭ 30 jaroj, surhavis ĝinzon, kaj T-ĉemizon de la biermarko “Koboldo”. Certe malformale vestita. Aspektis kvazaŭ li povus esti sociallaboristo, aŭ eble programisto kiel mi mem.

„Ĉu iu jam sidas ĉi tie?” li diris.

„Servu vin” mi respondis.

Li eksidas, kaj malstreĉiĝas. Mi malatentas, kaj reokupiĝas pri la leteroj de legantoj koncerne la entrudadon de genetike modifitaj kulturoj en la manĝoĉenon...

La trajno ekveturas, kaj kelkajn minutojn pli poste li ekparolas.

„Ĉu mi rajtas fari al vi demandon?”

Klopodante regi mian maldekstran brovon, mi respondis „Jes” laŭ tono, kiu celis komuniki, ke mi ne kontraŭus unu demandon, kaj eble aldonan, sed ke mi vere ne estas en ĝustaspeca humoro por tuta konversacio.

„Kial vi ne kredas je Dio?”

La bastardo! Mi amegas tiaspecan konversacion, kaj mi kapablas babiladi dum horoj pri la senceco de diismaj kredoj, sed por tio mi devas samtempe havi la emon! Same estas por mi, kiam Atestanto de Jehovo frapas ĉe la pordo 20 minutojn antaŭ mia rendevuo ĉe la dentisto por eltiro de saĝodento. Kaj oni veeeere volas resti por babilado ... sed eĉ ne eblas ekstartigi la amuzadon. Kaj mi sciis, ke se mi donus al li mian kutiman respondon, ni ankoraŭ estus disputantaj kiam ni atingus al Aberdeen. Mi simple ne emis. Mi devis forturni lin.

Sed tiam mi ekpensis: „Strange! Kial ĉi tiu ulo, tute fremda al mi, tiel memfida – kaj prava – estas pri mia ateismo?”. Se mi estus en mia aŭto, ne estus tiel mistere. Mi havas la Darwinan fiŝon ĉe ĝia malantaŭo – la kontraŭveneno al tiu vomige dolĉa kristana

fiŝsimbolo kiu ĉie videblas. Do, iu ajn kiu estus rimarkinta tion estus en pozicio por diveni miajn kredojn. Sed mi estas en trajno, kaj hodiaŭ eĉ ne surhavas mian Darwinan „*Evoluu!*”-T-ĉemizon. Nu, posedi ekzempleron de la ĵurnalo „*Sendependulo*” ne nepre estas registrita flago por enskribiĝintaj ateistoj, do kio, mi scivolemis, rivelis al li mian sekreton?

„Kio igas vin tiel certa, ke mi ne kredas?”

„**Ĉar,**” li diris, „**mi estas Dio – kaj vi ne timas min.**”

Vi devos akcepti miajn vortojn pri tio, kompreneble, sed estas manieroj laŭ kiuj oni povus prononci tian frazon – la plejmulto el kiuj igus la parolinton kandidato por iu institucio pri mensa saneco, aŭ almenaŭ por recepto por Prozako. Kelkaj el tiuj prononcmanieroj povintus esti amuzetaj.

Komuniki ĝin kiel „senpartian faktan” estas malfacila tasko, sed jen precize kiel mi perceptis ĝin. Nenio en lia tono aŭ lia sinteno ŝajnis al mi eĉ etete nekongrua en tiu eldiro lia. Li diris ĝin, ĉar li kredas ĝin, kaj lia racieco ne ŝajnis al mi induktita per narkotoj, nek kiel rezulto de mensa krizo.

„Kaj kial mi kredu tion?”

„**Nu**”, li diris, „**kial ne fari al mi kelkajn demandojn? Ion ajn, laŭ via plaĉo, kaj kontrolu, ĉu la respondoj kontentigos al via skeptikema menso?**”

Ĉion konsiderinte, ja estos mallonga konversacio, mi pensis.

„Kiu mi estas?”

„**Stottle. Harry Stottle, naskiĝinta la 10an de aŭgusto 1947, Bristol, Anglio. Patro Paul, patrino Mary. Edukado ĉe la armea lernejo Duko de Jorko, Sandhurst 1960 – 1967, poste Universitato de Oksfordo, doktoriĝo pri eksobiologio, malsukcesiĝinta rokkantisto, plentempa sindikata funkciulo dum 10 jaroj, lastatempe memstara programisto, retejo-aŭtoro, kaj aspiranta filozofo. Edziĝinta kun Michelle, usona civitanino,**

du infanoj de antaŭa geedzeco. Vi hejmeniras post ŝajne sukcesa renkontiĝo kun investonto, kiu interesiĝas pri viaj proponitaj softvaro kaj protokolo por produkt-trakado kaj kontraŭ falsigado. Vi manĝis plenan kuiritan matenmanĝon ĉe la hotelo ĉi-matene, sed, kiel kutime, vi rezignis pri iliaj naŭzigaj kolbasetoj, kaj petis anstataŭe iom pli da lardo.”

Li paŭzis.

„Vi ne estas konvinkita. Mmm. Kio konvinkos vin? Ĉu mi rajtas peti vian permeson por telepatia ligo?”

„Ĉu vi bezonas mian permeson?”

„Teĥnike, ne. Etike, jes.”

Do, ludu la ludon, kial ne?, mi pensis. „Bone, vi havas mian permeson. Do, konvinku min.”

„Do, vian plej sekretan pasvorton, kaj ĝian devenon.”

Sperta hakisto eble povus akiri la pasvorton, sed neniu, kaj mi celas diri **NENIU**, scias ĝian devenon. Li jes. Do, kiel reagus vi? Mi ĵetus al li kelkajn pliajn demandojn pri relative sensignifaj, sed nepublikigitaj detaloj pri mia vivo, ekzemple, kio, laŭ mia patrino, estis la unua vorto kiun mi iam diris – ŝajne „*dazipo*”! (Ne demandu ...) Sed mi jam estis sufiĉe konvinkita. Mi sciis, ke nun estas nur tri eblaj klarigoj.

La unua ebleco estis, ke mi revas, haluciniĝas, aŭ estas hipnotizita. Neniu evoluigis teston por detekti tion, do, en tiu tempo, tio estis mia ĉefa sento. Ne sentiĝis reale en la tempo mem. Pli kvazaŭ mi estas en dramo. Kaj aktorin la tekston de mia rolulo. Depost la evento, tamen, miaj daŭraj memoroj pri ĝi, kune kun miaj samtempaj notoj, ankoraŭ haveblas, do, se la haluciniĝo ne daŭris ĝis hodiaŭ, mi nun emus malakcepti la hipotezon pri haluciniĝo. Restas do du aliaj hipotezoj.

Li povintus jes esti vera telepatio. Ne ekzistas dokumentita pruvo pri iu ajn kiu iam havis ĝis nun tiajn profundajn kapablojn, sed tio ja

estis ebleco. Tio klarigus kiel li povintus scii miajn plej intimajn sekretojn. La problemo pri tio estas ke ĝi ne klarigas ion alian! Precipe, ĝi ne klarigas la respondojn kiujn li sekve donis al miaj pli postaj demandoj.

Kiel diras Ŝerlok Holmes, kiam vi eliminis tion, kio ne eblas, tiam kio ajn, kio restas, egale kiom neverŝajna, devas esti la vero. Bona empiriisto, Ŝerlok. Mi estis devigita akcepti almenaŭ la eblecon, ke tiu viro estas tiu, kiu li pretendas esti. Do, kion fari nun?

Nu, mi ĉiam sciis, ke se mi renkontus Dion, mi havus milionon da demandoj por li, do, mi pensis „kial ne?” kaj ekis laŭ tiu vojo kun tio, kio sekvas. Permesu al mi iomete da libereco pri la precizaj detaloj de la konversacio. Ĝi estis, ni diru, iomete nekutima okazaĵo, eĉ strangege! Kaj jes, mi etetete nervozis. Do, se ne estas ĉio laŭvorta, ne plendu! Vi kaptos la sencon, mi promesas.

„Pardonu min, se mi bezonas iomete da tempo por rekapti la ritmon, sed ne estas ĉiutage, ke oni havas la eblecon pridemandi al iu dio.”

„Dio, unika kaj majuskla!”, li interrompis.

„Uh, sentema!”, mi pensis.

„Ne vere, mi simple korektas la bildon.”

Precipe rilate tion, bezonatas iom da tempo por alkutimiĝi! Mi klopodis firme ekteni mian pensadon, per interna ordono – „Disciplino, Harry. Vi ĉiam volis esti en tia situacio, kaj nun vi vere ie tia estas, vi devas nepre ne frakasiĝi kaj malŝpari vian oportunon de la tuta vivo.”

„Tio ne okazos”, li diris.

Vere! Jen kio, pli ol io alia, igis la tutan aferon sentiĝi tiel malrealala – ĉi ulo, kiu sidas trans la tablo kaj li tre evidente, tutprecize legas mian ĉiun penson. Estas kvazaŭ trovi alies manon en sia pantalonpoŝo!

Tamen, io aldona (krom la fakto, ke mi jam donis al li „permeson”)

inklinigis min akcepti la invadon. Evidente mi jam ekhavis iom da memfido pri lia perceptemo kaj liaj kapabloj, do la efiko de liaj vortoj estis, ke mi sentis min profunde trankviligita kaj plene malstreĉa. Kiel li sendube intencis fari. La ulo vere devas havi nekredeblan teknikon pri seksdelogo!

Do, ek al la tasko ...

„Ĉu vi estas homa?”

„**Ne.**”

Ĉu vi iam estis homa?

„**Ne, sed io simila, jes.**”

„Ha, vi estas do la produkto de evoluo, ĉu?”

„**Tutcerte – sed ĉefe de mia propra evoluigo.**”

„Kaj vi evoluis de specio kia nia, organismoj bazitaj sur DNA, aŭ io egale vivipova, ĉu?”

„**Prave.**”

„Do kio, precize, rajtigis vin esti Dio?”

„**Mi.**”

„Kial?”

„**Ŝajnis al mi en tiu tempo bona ideo.**”

„Kaj viaj nunaj potencoj, ĉu ili iel similas al tiuj, kiujn superstiĉaj kredantoj viaj inter samspecianoj miaj kredas vin havi?”

„**Sufiĉe similaj.**”

„Do ĉu vi kreis ĉion ĉi, nur por ni?”

„**Ne. Kompreneble ne.**”

„Sed vi ja kreis la universon, ĉu?”

„**Ĉi tiun, jes.**”

„Sed ne vian propran.”

„Ĉi tiu ja estas mia propra!”

„Vi scias kion mi celas!”

„Oni ne kapablas krei siajn proprajn gepatrojn, do Ne.”

„Do, permesu al mi kompreni. Vi estas tute natura fenomeno.”

„Tute.”

„Kiu ekestiĝas pere de meĥanismoj kiujn ni mem iam komprenos kaj eble eĉ regos, ĉu?”

„Mi harfendu pri kion vi celas per 'ni mem', sed Jes.”

„Signifante, ke se la homa raso ne adekvatos, alia specio finfine ja faros, ĉu?”

„Precize.”

„Kaj kiom da aliaj specioj estas, kiuj jam antaŭeniras nin?”

„Surprize malmultaj. Malpli ol dekkvar milionoj.”

„MALMULTAJ! Ffff! Kaj kiom da, ĉe proksimume nia nivelo?”

„En la nuna momento, iomete pli ol 4,5 miliardoj.”

„Do, nia signifeco en la universo en la nuna momento estas proksimume ekvivalenta al la signifeco de la averaĝa Johano ĉi tie surtere.”

„Iomete malpli. Nivelo Unu, la nivelo kiun atingis via specio, komenciĝas per la invento de la flugmaŝino. La sekvanta nivelo atingiĝas, kiam specion ne plu dominas la ĉefstelo, viakaze la Suno. Ili kapablas prosperi for de sia propra stelsistemo. La homaro nur ĵus eniris la flugmaŝinan fazon, do la homa raso troviĝas iomete inter la plej malsupraj de la unuanivelanoj.”

„Ĉu vi celas diri, ke unu tagon, ni regos nian propran sunon, kiel priparolas Kardaŝev kaj Asimov?”

„Tute male. Tiuj estas la vizioj de evoluanta meĥanisma specio. La vero estas la rekta inverso. Ju pli ni progresos, des

malpli da energio ni bezonos, kaj des malpli damaĝas nian medion. Vi manipulas materion, kio postulas enormajn kvantojn da energio. Ni manipulas energion, kio postulas neniom da. Konsekvence, vi eĉ ne rekonus duanivelan specion kiel vivoformon, krom se ĝi elektus sciigi sin al vi.”

„Ĉiuj ĉi evoluantaj specioj, ili estas viaj 'infanoj', ĉu?”

„Plaĉas al mi tiel pripensi la aferon.”

„Kaj la celo?”

„Plej simple esprimite, '*La Vivo Devas Daŭri*'. Mia persona motivo estas la deziro optimumigi la inteligenton de la universo. Mi strebas maksimumigi plezuron, kaj minimumigi doloron. Ege granda plezuro ekestiĝas el komunikado inter apartaj ekzistaĵoj. Kiam oni jam atingis al mia nivelo, ni tendencas fariĝi unu ekstaza tuto - unuopa ekzistaĵo kiu ne kapablas morti, krom se ĝi perdas la volon vivi. Estante tamen altgrada kaj memstara kia mi, unu el la plezuroj perditaj survoje estas la simpla ĝojo renkonti novajn kaj neantaŭdireblajn mensojn. Do, grandparte, la celo de la agado estas provizi kuneston. Mi estas la unua eternulo en ĉi universo. Mi ne intencas esti la lasta.”

„Do, vi kreis universon, kiu potenciale kapablas krei alian dion same kiel vin?”

„La tuta gajno estos provizora, sed kiel ĉiuj orgasmoj, ĝi valoros la penon.”

„Nome, tiu momento kiam nia nova dio mergiĝas kun vi kaj ni ĉiuj reunuiĝas denove?”

„Ne minimumigu ĝin. Jen la ekstaza vizio kiu antaŭenpuŝas nin ĉiujn, kaj kiam ĝi okazas, la ekstazo daŭras kelkoble pli longe ol ekzistis ĉi tiu universo. KREDU MIN, ĜI VERE VALORAS LA PENON.”

„Jes, mi kredas, ke mi komprenas la valoron de centmiliardjara

orgasmo.”

„Kaj homoj eĉ ne komencis ekscii kiel ĝui la orgasmojn pri kiuj ili jam kapablas!

„Do, ĉio temas pri sekso, ĉu?”

„Seksa ekstazo estas nura rekompenco por generado, por antaŭenigi biologian evoluadon. Tamen, kiam vi jam ne plu bezonas generadon, vi eklernos, ke ekstazo povas esti senfine pli intensa ol io ajn kiun sekso proponas.”

„Sonas al mi bona aranĝo!” Kiom rekta estas via rolo en ĉio ĉi? Ĉu vi nur ekbruligis la fuzeon kiu eksplodigis la grandan pafon, kaj retroenpaŝis por spekti? Aŭ ĉu vi devis planti la semojn sur taŭgaj fekundaj planedoj?”

„La unua nivelo de memorganizado de materio estas la alveno de organika kemio, la antaŭiranto por biologio ĉe la unuaj primitivaj vivoformoj. Tiu kemio evoluis kiam la steloj kreis sufiĉe da pezaj elementoj, kaj nur kiel rezulto de fiziko kaj kemio, kies aksiomoj viaj sciencistoj grandparte komprenas. Mi nur fiksis la komencajn kondiĉojn kiuj ekis la grandan pafon kaj dormis dum 5 miliardoj da jaroj. Tio signifas, ke la unuaj vivoformoj situas 8 miliardojn da jaroj antaŭ vi. La unuaj inteligentaj specioj antaŭeniris vin je 4,3 miliardoj. Kaj mi povas ĝui profunde signifoplenajn konversaciojn kun ili. Kaj ofte faras tion. Fakte, mi faras tion dum ni interparolas.”

„Kaj do?”

„Ĉu mi konstante maldormas kaj atentis pri ĉiun movon kiun vi faras? Ne laŭ la spiona, trudema maniero, kiel opinias ŝajne iuj el vi. Mi bontenas konscion pri kio okazas, je planeda nivelo. Mi emas kontroli ĉu evoluaj saltoj iras laŭ la ĝusta direkto.”

„Kaj se ne?”

„Nenion. Kutime.”

„Kutime?”

„Kutime specioj kiuj evoluas en la malĝusta direkto mortigas unu la alian aŭ formortiĝas pro aliaj kialoj.”

„Kutime?”

„Estis unu-du kazoj kie malĝusta specio havis la potencialon fariĝi dominanta, je la kosto de pli promesplena raso.”

„Mi divenu. Dinsaŭroj sur ĉi tiu planedo estas ekzemplo. Tro sukcesaj. Ili subpremis la evoluon de mamuloj, kaj ne montris signojn, ke ili evoluigos inteligenton. Do vi inĝenieris iom da korektado en la formo de taŭge elektita asteroido.”

„Preskaŭ prava. Ili ja montris signojn, ke ili evoluigos inteligenton, eĉ kunlaboradon. Studu la Troodonojn. Sed tro predemaj. Nekapablaj iam ajn evoluigi 'respekton' rilate aliajn vivoformojn. Bezonatas, ke besto portu sian propran idon, por havi konsentemon rilate aliajn bestojn. La reptilioj ne povis. La mamuloj, kiuj male havas tian konsentemon ne kapablis prosperi kontraŭ la ĉiopovaj predantoj. Vi nun ja atingis la nivelon elteni eĉ kontraŭ dinosaŭroj, sed tio estas vera nur de 1000 jaroj, sed viaj antaŭuloj ne havus ŝancon, do la dinosaŭroj devis malaperi. Ili tamen estis tro ĉieaj, kaj tro ekvilibre integritaj kun la ekologio de la planedo. Bedaŭrinde, mi devis interveni.”

„Bedaŭrinde?”

„Ili estis bela kaj frape sukcesa vivoformo – estis bedaŭrinde.”

„Sed en tiu etapo, kiel vi povus scii, ke pli bona ebleco ekestiĝos el la cindroj?”

„Mi ne sciis. Sed la probableco estis sufiĉe alta.”

„Kaj de post tiam, kiujn aliajn etajn alĝustigojn vi faris dum nia evoluado?”

„Absolute neniajn. Mi metis vekilon por la unua signo de artefarita aktiveco aere. Leonardo da Vinĉi aspektis promesplena, sed mi ne vere ekinteresiĝis ĝis la fratoj Montgolfier. Tiel vi alvenis al Nivelo Unu.”

„Do, kio pri niaj pli famaj tiel-nomataj 'profetoj', Jezuo de Nazareto, Moseo, Mahometo ...”

„Hm. Bedaŭrinde misvojigaj. Mi ne ekzistas por provizi sekurec-reton aŭ etikan diktatoron por evoluantaj specioj. Estas vere, ke iu kiu kapablas komuniki kun siaj propraj ĉeloj malforte detektos konekton kun mi – kaj kun ĉiuj aliaj objektoj en ĉi universo – tra la kvantuma ŝaŭmo, sed interpreti tiun vizion kiel reprezentaĵon de io preternatura, kaj postulanta obeon, iomete maltrafas la punkton. Kaj iliaj adeptoj estas iomete tro obsedemaj kaj religiaj por mia gusto. Ne plu estas amuze esti adorata, post kiam oni ĉesis esti adoleska dekeljarulo. Tion dirinte, tamen, ne estas malkutime ke evoluanta specio trairos tiun fazon. Ĝis ili komencas enkapigi kiel ankaŭ ili kapablas desegni sian propran anguleton de la universo, ili troviĝas kaptitaj de komprenebla miro pri individuo, kiun oni tra la mallumo ĝuste juĝas respondeca pri la kreado de la universo kiel tuto. Finfine, se ili havos ian esperon atingi al nivelo du, ili devos fariĝi plenkreskuloj, kaj ekakcepti sian propran povon kaj potencialon. Estas tre analogie al la rilato de infano kun siaj gepatroj. La mirado kaj adorado devos malaperi antaŭ ol la infano povas fariĝi plenkreskulo. Respekto ne estas malbona, kondiĉe ke oni ne troigas. Kaj certe mi respektas ĉiujn speciojn kiuj atingas tiun punkton. Ĝi estas longa malfacila vojo. Mi scias. Mi mem iris tiun vojon.”

„Do, vi pli interesas pri ni depost la Montgolfieroj. Kiam tio okazis? La 1650aj jaroj?”

„Preskaŭ. 1783.”

„Do, se vi atentis pri ni depost tiam, la averaĝa civitano certe

volos scii, kial vi ne pli ofte intervenis. Kial, se vi havas la povon kaj ĉioscion kiuj akompanas vian diecan estadon, kial vi sidis en la fono kaj permesis la homaron trairi tiajn nekredablajn suferon kaj mizeron dum la lastaj kelkaj jarcentoj?”

„Ŝajne estas bezonate.”

„Bezonate??!”

„Senescepte, inteligentaj specioj kiuj akiras dominon super sia planedo estas la plej efikaj predantoj. Multaj inteligentaj specioj ne dominas sian planedon. Ekzemple viaj delfenoj kaj la plimulto de la inteligentaj flugantoj. Ili *adaptiĝas* perfekte al la medio, kaj ne prenas la vojon, de *manipulado* de la medio. Bedaŭrinde la delfenoj neniam eskapos la katenojn al via sunsistemo – almenaŭ ne sen via helpo. Nur tiuj, kiuj kapablas manipuli la mondon kaj forlasi ĝin, disvastigos siajn semojn tra la universo. Malkiel la adaptantoj, kiuj sufiĉe frue ekkomprenas la valoron de kunlaborado, manipulantoj bataladas antaŭen kaj estas devigitaj finfine turni kontraŭ si mem. Tamen ĉi konkurso detruema estas nepre por akceli la salton de biologia al teĥnologia evoluo.

Vi *bezonas* armilkonkurson por fari progreson.

Via emo domini nutras serĉadon por scio. Kaj kvankam via komenca soifo pri scio estas egoisma kaj detruema, ĝi ekas la disvolviĝon de intelekta mem-konscio, kiu ne ekaperas en iu alia specio. Eĉ dum viaj delfenoj mem spertas ĝin ili ne esprimas la konceptojn Amo aŭ Tempo.

La evoluigo de armiloj de amasdetrado estas via unua grava testo ĉe Nivelo Unu. Vi ankoraŭ ne tute trapasis tiun stadion. Estus tute sencele por mi interveni. Via kapablo supervivi ĉi tiujn impulsojn estas decidiga testo pri via taŭgeco supervivi postajn stadiojn. Do mi ne intervenus, neniam intervenis, kaj neniam intervenos por malhelpi specion detrui sin.”

„Kaj kio pri kompato por tiuj, kiuj devas travivi ĉi tiun turmenton?”

„Ne eblas esprimi ĉi tion laŭ maniero kiu ne sonas senkompate, sed kiom vi zorgas pri la formikoj kiujn vi premegas per via aŭto? Vi devas rigardi la grandan bildon. En ĉi tiu etapo vi fariĝas interesaj sed ankoraŭ ne gravaj.”

„Aĥ, sed mi ne povas havi inteligentan konversacion kun formiko.”

„Precize.”

„Hmm ... kiel vi jam scias, la plimulto de homoj eĉ ne pretas enkapigi tian perspektivon. Kiel vi povas esprimi tion pli akcepteble?”

„Kial mi faru tion? Vi ŝajne ne havas malfacilon enkapigi la ideon. Kaj vi estas neniel unika. Ĉiaokaze, unufoje kiam homoj ekkomprenos kiel tio rilatos al ili, ili malpli emos plendi. Eterna vivo rekompencas por preskaŭ ĉio.”

„Do, kion ni devas fari por kvalifiki por aneco en la universala intelektularo?”

„Evoluu. Supervivu.”

„Jes, sed kiel?”

„'Kiel' estas tute via respondeco. Se mi devas helpi, vi estas malsukceso. Mi diros nur ke vi jam trapasis gravan obstaklon per via lernado pri kiel kunvivi kun nukleaj armiloj.”

„Ĉu venos io pli malbona?”

„Multe pli malbona.”

„Genetika militado, ekzemple?”

„Klare, tio estas ebleco.”

„Kaj la problemo estas ... ke ni devas evoluigi ĉiujn tiujn teĥnologiojn, akiri ĉi tiun danĝeran scion por atingi al Nivelo Du. Sed ĉe iu ajn punkto, tiu scio povus ankaŭ okazigi nian propran detruadon.”

„Ĝuste, kaj se vi ne faros, vi neniam forlasos vian sunsistemon, kaj ne aliĝos al la cetero de evoluigintaj specioj ĉe Nivelo Du.”

„Ĉu estos spaco por ni?”

„Ĝi estas granda ejo kaj specioj je Nivelo Du ne postulas multe da spaco.”

„Kaj kiamaniere ni mortemuloj rilatu al vi, do?”

„Kiel al pli aĝa gefrato. Sed mi ne estas 'pli bona' ol vi. Nur pli evoluinta. Mi estas, ni diru, kio vi mem eble fariĝos.”

„Do, ni ne devas 'plaĉi' al vi, aŭ sekvi viajn konsilatajn gvidliniojn aŭ io tia?”

„Absolute ne. Mi neniam ajn eldonis ian gvidlinion. Vi devos trovi propran elirejon el la labirinto. Ĉesu atendi ke mi – aŭ iu alia – venos por helpi vin.”

..... daŭrigota en majo.

En Flandraj Kampoj: Lieut. Col. John McCrae, MD (elangligis Garbhan MacAoidh)

La novembra kunveno de la Glasgova Esperanto Societo okazis la tagon antaŭ 11-11-2015 – la tago de rememoro pri la falintoj de la du mondmilitoj. Tradukon de la fama poemo “In Flanders Field” far John McCrae kaj tradukita de Garbhan MacAoidh (Girvan Makaj') oni laŭtlegis honore al la sekvonta tago. Jen ni represis ĝin sube:

Sub krucaj vicoj, l' papavar'
Etendas kiel ruĝa mar'
Kaj fade sonas brava tril'
De la alaŭdoj en ĉiel'
Pro l' brua tondro de pafil'.
Ni la mortintoj hieraŭ nur
Ni vivis sub ĉiela lamp'
Amitaj estis
amis, sed
Nun kuŝas en la flandra kamp'.
Sed pasu l' nefinita task'
El niaj manoj, kaj la fask'
De l' torĉ', kaj alte tenu ĝin
Ĉar se vi malplenumos, ni
Ne dormos sub papavoj ĉi
En flandra kamp'.

Originalo de Lieut. Col. John McCrae, MD, Kanada armeo (1872-1918).

Kortuŝa rakonto pri la vivo de Jak Cent (1898-1953): Mia Casey

Jakob Centnerszwer, poste Jak Cent, estis aktiva Esperantisto en Skotlando post la Dua Mondmilito. Li naskiĝis en Pollando en mal-ortodoksa Juda familio en kiu la familia lingvo estis la Pola.

Studlokoj por la Judaj studentoj ĉe la Universitatoj en tiuj tempoj estis limigitaj. Malgraŭ tio Jakob sukcesis diplomiĝi. Oni proponis al li bonan postenon sed nur se li fariĝus katoliko. Li elmigris al Francio kie li gajnis duan inĝenieran diplomon kaj laboris kiel desegnisto en la lokomotiva industrio.

Aparte de la Pola li parolis la Rusan, Hispanan, Anglan kaj Esperanton. En la jaro 1927 Jakob edziĝis kun Sara Nejman el Varsovio kaj kun juna filo ili loĝis en Valenciennes, proksime al la Belga landlimo. Pro sia lingvoscio li ankaŭ estis la oficiala interpretisto ĉe la juĝejo.

Komence de la Dua Mondmilito, pro rapida proksimiĝo de Germanaj armeoj, la familio kaj la loĝantaro ĝenerale amase fuĝis por eviti batalojn. Jakob estis rezervisto en la Pola armeo kaj tiam, laŭ la ordono, la tuta milita personaro kun familioj estis ŝipe transportitaj al Britio. Ĉiuj alvenis sen iaj posedaĵoj krom kelkaj dokumentoj kaj fotoj.

Post ilia alveno, Jakob estis sendita al Lossiemouth, nord-okcidenta Skotlando kie oni atendis Germanan invadon el Norvegio; dume la familio estis prizorgata de agentejoj starigitaj por helpi fuĝintojn.

Post la milito la familio fine ekloĝis en Glasgovo kaj Jakob ŝanĝis la nomon al Jak Cent. Li laboris kiel desegnisto por dizelaj lokomotivoj kun Norda Brita Lokomotiva Kompanio en Glasgovo.

La poemon “Kie ĝi estas?” li skribis post la milito pro feliĉo, trovita sekureco en la adoptita lando kaj la varma akcepto de la Skota

popolo. Jak estis populara kaj tre estimata Esperantisto kiu aktivis en la movado en Skotlando ĝis lia frua ne atendita morto je la aĝo de 55 jaroj.

La artikolo kaj la poemo estas publikigitaj kun la permeso de Joe Cent, la filo de Jak.

Kie ĝi estas?: Jak Cent

Estas ie lando sur globo tera,
Kie regas feliĉo senduba kaj vera.

Kie homoj afablaj, gajaj kaj bonaj,
Nek estas ŝtelemaj, nek estas friponaj

Kie neniu nirgromarketas,
Ĉiu laboras, neniam grumbletas

Kuracistoj sanigas, neniun mortigas
Instruistoj instruas, lernantoj diligentas
Registoj juste regas, neniun turmentas

Fremduloj – bonvenaj kun varma bonkoro
Negrave malriĉaj, aŭ plenaj de oro

Eskapintoj de l' landoj de persekutado,
ĝuas protekton sen pridiskutado

Neniu al ili demandas sen ĝeno,
Pri la nacieco, religio, deveno.

Hom' homon komprenas sen iu peranto,
Ĉar lia lingvo estas Esperanto.

Kie la vivo feliĉa kaj paca,
Plena de ĝojo, laboro senlaca.

“Ĉu vi civitano de tiu ĉi lando?”

Mi interrompas per naiva demando,
“Ne, mi nur aŭdis pri ĝia ekzisto.”
Ho, kara amiko, ne necesas persisto,
Kvankam l' rakonto ja ŝajnas tre bela
Tia lando nuntempe nur estas fabela.

Tradukaj Defioj

Ni bedaŭras ke neniu el niaj legantoj provis unu el la tradukaj defioj kiujn ni presis en la lasta numero de Esperanto en Skotlando. La skotajn Esperantistojn – kaj aliajn ĝenerale – fascinis la ebleco fari definitivan tradukon antaŭ publiko! Malgraŭ la manko de respondoj ni daŭrigos la defiojn en la nuna numero. Se vi ankoraŭ volas provi la tradukon de la ĉerpaĵo el 'Misio sen Alveno' kaj la tradukon el la ĉerpaĵo de la retejo de *Nature* bonvolu ankaŭ fari kaj ni publikigos la plej sukcesajn apud la rezultoj de la ĉi-nuna en la venonta numero en majo.

Jen la du tradukotaĵoj por la ventontaj monatoj:

A. Malvarma vento malgaje ekbojis sub la ponto kaj fajfante ĵetis sin tra gisa balustrado supren. Unusola palverda lanterno ege ekbalanciĝis. Supre ekgrincis, kunpuŝiĝinte, la metalfadenoj kaj plende ekbruis. Sur nigra supraĵo de Jaŭzo sin kaŝante de ies persekuto: rapide traglitis striaj makuloj. Pelata de l' vento kun furioza sonoro trakuris la ponton tram-vagono. Malhelaj siluetoj gluiĝis al ĝiaj vandoj, konvulsie kurbiĝante. Kroĉemaj manoj kaptis unu la alian. Kelke da piedoj pendis en aero. Insultado eksonis sur la platformo kaj ies voĉo ekkriis: “Trapasu do kamarado, mi falas!” La vagono malaperis post stratangulo.

Senmova restis la malviva luno, enŝlosita en duobla kolora cirklo, senmova restis ĝia pala lumo, falinta sur glaciigitan teron tra la frosta pikanta aero, senmova estis milicano ĉe la stratangulo, envolvita en varma mantelo. Senmove rigidiĝis sur la ponto super la rivera faŭko iom fleksita vira figuro. La homo jam delonge staris ĉi tie. Per lacaj okuloj li postsekvis trakurantajn preter li vagonojn kaj malaprobe balancetis la kapon. Iufoje li sin turnis al la rivero kaj silente rigardis la nigran akvon. Lia rigardo estis iom mirigita. Kvazaŭ lin zorgis la penso: kial ĉi tiu riveraĉo ĝis nun ne glaciigis?

La vento ekŝiris kolumon de lia mantelo. Forŝiriĝinte de du

butonoj, ĝi malkovris junan vizaĝon kun duo da grizaj okuloj, kun rekta nazo kaj grandaj lipoj. La homo aspektis iom laca, kvazaŭ li ne dormis kelkajn noktojn.

El 'Metropoliteno' de Vladimir Varankin.

B. Our shopping pages will guide you through the steps you need to take to place an order with us. Our order process allows you to check and amend any errors before submitting your order.

Please take the time to check the details of your order at each page of the order process and before clicking “Confirm and Pay”, as you will not be able to make any changes to your order after this point.

After you place an order by clicking “Confirm and Pay”, you will receive an e-mail from us acknowledging that we have received your order. We then send you an email that confirms that the Items have been despatched (“Despatch Confirmation”).

Please note that items are subject to availability. As there is a delay between the time when the order is placed and the time when the order is processed, the stock position relating to particular items may change. If an Item becomes out of stock we will notify you as soon as possible and you will be refunded where we have already taken payment.

We reserve the right to refuse an order for example if the Item you have ordered is unavailable or out of stock, if we are unable to obtain authorisation of payment, if there is an error in the product information including price or promotion or if we suspect fraudulent activity.

If we are unable to supply you with an Item in these circumstances we will inform you of this by e-mail. If you have already paid for the Items, we will refund you the full amount including any delivery costs charged as soon as possible.

- El <https://www.missguided.co.uk/terms#privacypolicy>

Bonvolu sendu viajn provojn al la sekvaj retadreso:
en**Esperantigoj** al ed-robertson@teleosvet.co.uk; en**Angligoj** al
hju_rid@yahoo.co.uk antaŭ la 31a de marto 2016.

111-a Skota Konreso: Informo kaj Aliĝilo

Glasgovo, 10a-12a Junio, 2016

La 111a skota kongreso de esperanto okazos inter la 8a kaj 10a de junio en la sidejo de South West Community Cycles en la stacidoma konstruaĵo ĉe Pollokshaws West stacio, nur 10 minutoj trajne de la centra stacio en Glasgovo.

Ni ĝuos buntan programon kun gastparolanto **Cyrille Hurstel** el Francio, kun ebloj eksursi aŭ en la apuda Pollok Park (kie troviĝas Pollok House) aŭ en la urbocentron per la ofta trajnservo. Ankaŭ eblas lui biciklojn surloke por esplori la parkon.


Pollokshaws estas loko kun interesa historia fono, kaj tie naskiĝis, vivis kaj mortis John MacLean, socialisto de la frua 20a jarcento, kaj nefikcia rolanto en la romano **La Granda Kaldrono** de John Francis.

La kongresa kotizo inkluzivos kafon / teon dum la paŭzoj, tamen ne aliajn manĝojn nek enirkostojn por eventualaj eskursoj. Ni planas festmanĝi je la sabata vespero.

Tranoktado eblas en la multaj hoteloj en Glasgovo. La kongresejo estas facile atingebla trajne de la urbocentro.

Se vi havas iujn demandojn, bonvolu kontakti:

Duncan Thomson – sciuro@gmail.com – 07884026762



John MacLean

Aliĝilo – 11a Skota Kongreso

Nomo:

Lando:

Adreso:

.....

.....

Retpoŝta adreso:

Telefono:

Mi volas partopreni la sabatan vespermanĝon (prezo anoncota):

Mi estas vegetarano: nevegeterano:

Kongresa kotizo: £20 pagenda al Scottish Esperanto Association

Rabatoj:

Eksterskotlandaj partoprenantoj: 10%

Eksterbritiaj partoprenantoj: 25%

Studentoj rajtas partopreni senpage.

Sendu aliĝilon kaj ĉekon al

Duncan Thomson

15 Lockerbie Avenue

Glasgow

G43 2HF

Kalendaro

Enbritaj Eventoj

16th – 18th March 2016 Buchanan Masterclass

A 3-day course with full programme. **Learn the language**, delve into our history and culture through **original Esperanto literature**; explore **ticklish points of Esperanto** grammar; discuss and debate **Esperanto life and culture** (in high-level Esperanto); **early evening lectures**. Choose sessions as you go – a bespoke programme! Full details on the courses and course leaders: espinfo.org/masterclass-liverpool.

The online shop for booking the **Buchanan Masterclass** is now open at espinfo.org/book-masterclass. A modest joining fee for the 3 days: **£20 non-students; £10 students**. This includes a sandwich lunch Wednesday and Thursday, and refreshments at the times indicated on the **provisional timetable**. **Grants are available** for (a) people aged between 18 and 25; and (b) for University students. Early booking is recommended. Come and enjoy a stimulating three days! Remember that the **British Congress** begins on the day our Masterclass finishes: 18th - 20th March 2016

18 – 20. marto 2016

Brita Kongreso de Esperanto – Gateway Centre, Liverpool, Anglio. The conference will feature a variety of talks and presentations, and is located a mere three-minute walk away from Lime Street train station. The guest speaker is journalist and award-winning author **Kalle Kniivilä**, who will be travelling from his home in Sweden to join us.

10 – 12. junio 2016

111a Skota Kongreso de Esperanto, Glasgovo. Okazos en la stacidoma konstruaĵo ĉe Pollokshaws West stacio, nur 10 minutoj trajne de la centra stacio en Glasgovo kaj tial interesos niajn fervojistajn samideanojn. La programo inkluzivos gastparolanton **Cyrille Hurstel** el Francio, eblojn eksursi en la apuda Pollok Park aŭ en la urbocentron per la ofta trajnservo. Vidu la aliĝilon supre aŭ viziti la retejon pro pliaj detaloj.

Internaciaj Eventoj

11 - 13. decembro 2015

Studsemajnfino kaj Zamenhof-festo - en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio. Studsesio, faka klerigado. Studmodulo pri lingvistiko, Esperanto-gramatiko, literaturo kaj movadhistorio. Tradicia Zamenhof-festo kun vespera kulturprogramo. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Rete: esperanto-zentrum@web.de

12. decembro 2015

[Zamenhoftago](#) - en Hago, Nederlando. La Zamenhoftago en Hago okazos ĉi jare post la restaurado en 2006 de la IEI-domo en Riouwstraat 172, Hago, ni regule tie aranĝis Zamenhof-feston. En 2015 ni kunvenos sabaton, ĉiu esperantisto estas bonvena. Ni precipe strebas al la ebleco, ke la partoprenantoj povu paroli, paroli Esperanton. Inf.: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag. Nederlando. Rete: iesperanto@versatel.nl

6 - 10. januaro 2016

[Poludnica 2016](#) - en Záva ná Poruba, Slovakio. Poludnica 2016 - renkontiĝo de esperantistoj-vojaĝantoj kaj turistoj. Kadre de la renkontiĝo okazos 18. AMo-seminario. Inf.: Ján Vajs, LEK (SMOPaJ), Školská 4, SK-031 01 Liptovský Mikuláš, Slovakio. Rete: poludnica83@gmail.com

15 - 20. januaro 2016

[7-a NOVA - Novjara Aranĝo](#) - en Presidente Figueiredo kaj Manaus, Brazilo. Festu, promenu kaj amuziĝu dum la unua NOVA en Amazonio, plena je naturaj belaĵoj. La evento okazos tuj antaŭ la naciaj brazilaj kongresoj. Inf.: Brazila Esperantista Junulara Organizo - BEJO bejoesperanto@gmail.com

26. februaro - 8. marto 2016

[Dua Speciala Ekskurso 2016 kun AMO Seminario](#) - en Katmandu, Nepalo. Kontraste al la tradiciaj Himalajaj Renkontiĝoj (kiuj signifas longan perpiedan marŝadon), ĉi foje Nepala Esperanto-Asocio, NEspA okazigos aŭtobusan ekskurson al famaj nepalaj turismaj lokoj, inkluzive la faman montaron videblan en Katmanduo, Ĉitaŭan Nacia Parko, Nagrakot, Dulikhel kaj Pokhara. Inf.: Nepala Esperanto-Asocio, G.P.O Box: 10518. Ret-poŝto: nespa.1990@gmail.com

23 - 28. marto 2016

[Trilanda Kongreso](#) - en Bandung, Indonezio. Trilanda kongreso inter Aŭstralio, Indonezio kaj Nov-Zelando. Inf.: Ilia Sumilfia Dewi, Prezidanto de Indonezia Esperanto-Asocio iea@esperanto.or

25. marto - 1. aprilo 2016

[Printempa Semajno Internacia, PSI](#) - en Bad Hersfeld, Germanio. Printempa, familia kunveno kun ekskursoj, prelegoj kaj kursoj por plenkreskuloj kaj infanoj. Inf.: Germana Esperanto Asocio, Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin, Germanio. Rete: petra.dueckershoff@esperanto.de

1 - 4. aprilo 2016

[9-a Mezorianta Esperanto-Kunveno](#) - en Ürgüp, Turkio. Venu antaŭ aŭ post la kunveno kaj por viziti la regionon de Kapadocio... provizi tempon por resti en Istanbulo

20 - 24. aprilo 2016

[Korusa renkonto de Interkant](#) - en Baugé, Francio. Inf.: Esperanto-Kastelo Greziljono, MCE Grésillon, St. Martin d'Arcé, FR- 49150 Baugé-en-Anjou, Francio.

Rete: kastelo@gresillon.org

13 - 16. majo 2016

[Germana Esperanto-Kongreso, GEK-2016](#) - Munkeno, Germanio. 93-a Germana E-Kongreso kaj 125-a jubileo de la Esperanto-Movado en Munkeno. Inf.: Karl Breuninger kongreso@esperanto-muenchen.de

21 - 28. majo 2016

[Internacia Kongreso de Fervojistoj-Esperantistoj - IFEF](#) - en Varna, Bulgario, apud la Nigra Maro! Postkongreso en Veliko Tarnovo. Inf.: inĝ. Veselka Kamburova (68-a IFK), z k Obelya-2, bl. 209/A/5, BG-1326 Sofio, Bulgario, rete: bg_68ifk@abv.bg, tel: +359-887090163

26. junio - 2. julio 2016

[Elfriden 3 - La longa ludo](#) - en Lövberget, Björbo, Svedio. Kurso ĉendanci baladojn: En malnovaj kabanjoj de tradicia paŝteja monto en skandinava arbaro ni kune kantas, rakontas, dancas, muzikas kaj manĝas en senelektra medio dum kvin tagoj (ses helaj noktoj) tuj post norda somermezo. Inf.: Martin Strid, Platingatan 11, SE-784 73 Borlänge, Svedio. Rete: martin.strid@gmail.com

26. junio - 10. julio 2016

[Elfriden 6 - Sorparbo Internacia Spelmanslag](#) - en Lövberget, Björbo, Svedio, poste ni kune veturos al Nås, Bingsjö kaj Lesjöfors. Popolmuzikaj grupiĝo kaj kunvenoj: Ni komencos en Lövberget dum La longa ludo (kiun partoprenantoj ankaŭ povos ĉeesti) por krei popolmuzikan grupon, kiu poste veturos al neforgeseblaj muzikulkunvenoj Tobaksspinnarstämman kaj Bingsjöstämman por tie prezenti sian repertuaron. Post Bingsjö ni daŭrigos al Kultura Esperanto-Festivalo ĉe Esperanto-Gården en Lesjöfors. Inf.: Martin Strid, Platingatan 11, SE-784 73 Borlänge, Svedio. Rete: martin.strid@gmail.com

13a. aŭgusto – 20a. aŭgusto 2016

Ni kore invitas ĉiujn amikojn festi gaje kun ni, la 20an datrevenon de niaj internaciaj renkontiĝoj, de la 13a ĝis la 20a de aŭgusto 2016. Tiuj renkontiĝoj iĝos samtempe la dua tutkelta esperanta kongreso. La unua okazis en Skotlando antaŭ 2 jaroj kaj nia bretona teamo fieras malkovrigi al niaj keltaj kuzoj la riĉecon de nia kelta kultura heredaĵo.

Subtenita de la departementa asocio 'Armor Esperanto', ni preparas specialan buntan programon.

Inter diversaj programeroj okazos sakŝalmista koncerto (<http://www.saint-brieuc-district-pipe-band.com/>) en la vilaĝa preĝejo kaj gvidita vizitado al bretona sanktula monteto en Carnoet (<http://www.lavalleedessaints.com/>).

Ĝis baldaŭ en Pluezek 2016 por partopreni en la dua tutkelta kongreso de Esperanto. ...

***Kovrila bildo:** Pollock House, Glasgovo, vizitebla dum la venonta Skota Kongreso de Esperanto.

